2-a Jaro. N-o 50 (100) APERAS SEMAJNE 26. Aŭgusto 1926



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktanto: E. LANTY 14, Avenue de Corbéra, Paris-XIIe	Sidejo de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, Rue Boyer, Paris-XXe	Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig O 27





La Tutmonda Laborista Esperantistaro
jubileas :

LA KVINJARON

de SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

(1921-1926)

(Ses kongresoj : Praha, Frankfurt-a-M. Kasel, Brusel, Vien, Leningrad)




LA CENTAN NUMERON

de " SENNACIULO "

(1. oktobro 1924 — 26. aŭgusto 1926)

LA SEPJARON

de " SENNACIECA REVUO "

(1919 - 1926)


LA TRIJARON


de ELDONA KOOPERATIVO

(1923-1926. — 20 verkoj eldonitaj.)


KLASBATALO

PROLETLIBERIĜO



PROLETKULTURO




Ni forĝu Jubileo-ĉenon

Al la Ekzekutiva Komitato de SAT!

Karaj K-doj!

« En ĉi-tiuj monatoj fariĝas 5 jaroj de ekzistado de nia Asocio. Decas, miaopinie, inde eluzi ĉi-daton. Por la bono kaj gloro de nia ideo. Mi havas jenan projekton : malmultvorte :

Ni aranĝu sur la paĝoj de Sennaciulo *« Jubileo-ĉenon ». Kio ĝi estas ? Okaze de l' kvinjara ekzistado de nia Asocio, la SAT-anoj en la tuta mondo kiel ĝojesprimon donacas ioman sumon kaj tiele akiras ĉeneron en la Jubileo-ĉeno. Sed ne nur ĉiu K-do mem laŭpove municiu, sed alvoku imiti sian ekzemplon al siaj K-doj, konatoj, korespondantoj ktp. Donacu ne nur individuoj, sed ankaŭ grupoj, rondoj ; kaj ili alvoku aliajn grupojn kaj societojn. Ĉies honoro postulas respondi kaj ree alvoki aliujn ; tiele estiĝos implika ĉeno okaze de nia ok-jara jubileo, kaj la kaso de SAT pleniĝos. La monon oni uzu por la Eldona Kooperativo, kiu havas vastan agadkampon !...*

Praktike la afero estas tiela :

K-do 1 el A donacas por la Jubileo-ĉeno, ekz. 5 sv. frankojn, kaj vokas fari la samon al K-do 2 el B, ktp, ktp. La nomojn kaj sumojn oni publikigu en la gazeto.

K-do 3 el C respondas al K-do 4 per 5 sv. fr. kaj invitas imiti sian ekzemplon al K-do 4 el D.

Alia ekzemplo : La grupo el A kolektis 5 dolarojn por la Jubileo-ĉeno kaj esperas, ke la grupo el B imitos sian ekzemplon ktp.

Ne nur SAT-anojn oni invitu, sed ĉiujn konatojn kaj simpatiantojn... »

J. JURYSTA (227).



Ricevinte antaŭ kelka tempo la ĉi supran leteron kaj pridiskutinte ĝian enhavon, ni konsentis al la propono de nia K-do.

Ni ne aldonas longajn, senutilajn komentojn. Por montri nian aprobon, ni simple decidis forĝi la unuan ĉeneron per donacado de 150 fr. fr. Kaj laŭ la plano de la instiganto, ni nin turnas al la aliaj Ekzekutivanoj el Leipzig kaj Moskvo, kaj ankaŭ al la anoj de la *Sennacieca Konsilantaro* por ke ili same forĝu aliajn ĉenerojn per donacado de kelka mono. La Estraro de SAT ja devas montri al la tuta SAT-anaro la sekvindan ekzemplon.

Nun la « ora ĉeno » ekforĝiĝas. Ĉiuj helpu !...

LA PARIZAJ E. K-ANOJ.

Subjektivaj kaŭzoj de la sukceso de SAT

Neniu nun dubas pri la reala, kreskanta forto de nia movado. Estus tute senutile insisti pri tiu fakto. Prefere ni provu difini kaj montri kaŭzojn de la sukceso de SAT.

LABORISMO

La unua estas, ke la aktivaj SAT-anoj estas klaskonsciaj laboristoj, kiuj kuraĝe, senlace laboradis kaj senĉese penadis ne lasi sin trompi per brilaj manifestadoj, kies efiko estas ĉiam efemera. Ili ĉiam penis laŭeble forigi el nia movado la dandismon, kiu infektas la neŭtralan movadon. La gvidantoj ja ĉiam alvokis al metoda, modesta, senfanfarona laboro.

Ni ja scias, ke la laboro ne estas peno, sed male plezuro kiam ĝi estas farata memvole kun la konscio, ke oni laboras por la komuna bono kaj ne por iu rabema mastro.

En la libera laboro kuŝas eble la fundamento de l' moralo, tial mi ne timas paroli pri la laborismo *de SAT. En ĝi kuŝas vera forto kaj necesa kondiĉo de daŭra sukceso.*

PRAKTIKISMO

La libera laboro estas ja per si mem kvazaŭ idealo. Sed necesas, ke la penado havu aprobindan kaj difinitan celon. Oni povas prezenti al si homon, laborantan kaj ŝvitantan, kaj kies penado estus tamen tute sen ia bona rezulto por la socio.

La laborismo de la SAT-anoj estas gvidata de praktismo. Ili ĉiam penadas uzadi praktike *esperanton por siaj klasaj celoj ; ili firme konscias, ke la lingvo per si mem ne havas ian ajn atentindan valoron, se ĝi ne estas aplikata praktike.*

Ne ĉiam estas eble uzadi praktike la lingvon, sed tial ke la tuta kvinjara ekzisto de SAT celis tian uzadon, oni rajtas akcenti pri la praktikismo de nia Asocio.

LIBERISMO

Esperanto havas signifon nur per tutmonda uzado ; tial SAT ĉiam celis atingi, ke ĝi havu anojn en kiel eble plej da lokoj, el ĉiuj mondpartoj.

Sed tre diversaj estas la kondiĉoj en la mondo. Estus do tute ne saĝe, se oni celus starigi precizajn regulojn, aplikendajn ĉie same. Necesis lasi grandan liberecon, sufiĉan elastecon kaj neprecizecon en la Statuto de SAT. La vivo, la sperto devas ĉiutage instrui kaj montri, kio taŭgas aŭ ne. De supre faritaj decidoj kaj leĝoj plej ofte fiaskas, tial ke ili ne ĉiam kongruas kun la realo.

La malsaĝuloj *ne* abonas *Sennaciulo*-n.

Liberismo karakterizas nian organizon, kaj ĝi ebligis ties atingitan sukceson.

IDEALISMO

La legantoj bonvolu rimarki, ke ĉi-punkto venas nur laste, kvazaŭ konkludo, kaj ne kiel prologo.

Idealismo estas nur revo, metafizikaĵo, se-ĝi, laŭ la signifo mem de l' vorto, malatentas la realon, la krudajn faktojn. Sed mi opinias, ke la celado al perfekteco, estas ankaŭ fakto, *ke ĝi kuŝas en la koro kaj menso de ĉiu normale evoluinta kaj kulturita homo. Sekve ni ne devas malatenti tiun senpezan forton, kiu movigas multajn homojn. Kaj tian celadon al perfekteco mi nomas la SAT-idealismo.*

Nia Asocio devas ja esti iom saturita je tiaspeca idealismo: idealismo ne malligita de lą realo, sed male sin apoganta sur ĝin por atingi kiel eble plej alten.

Nia idealo estas la sennaciismo — ĝi estas ia anticipo, kaj prezentas al si ŝtupon, kiun certe atingos la socio en sia senhalta evoluado — pro la senĉesa malvolviĝado de la Scienco kaj Tekniko.

Kiel eble plej koncize mi provis montri subjektivajn kaŭzojn de la ĝisnuna sukceso de SAT. Tiuj kaŭzoj restu vivaj; ili estas necesaj por la estonta kreskado kaj prospero de nia kvinjara Asocio.

E. LANTY.

La centa numero de "Sennaciulo"

Cent numeroj!... Okcent paĝoj!...

Ni faldu libroformate la gazeton kaj jen, ni ricevas 3.200 paĝojn...

Per tio oni pli bone prezentas al si la laboron faritan dum du jaroj.

Ni ankaŭ prezentu al si la tre malbonan vivkondiĉaron de la laboristaro ĝenerale, dum la postmilita tempo, kiam ĉie regas senlaboreco, mizero — klasbatalo.

Kaj nun ni ekrigardu malantaŭen, al la antaŭmilita periodo, kiam relativa bonstato pli malpli ekzistis ĉie.

Se ni faras komparon inter la du periodoj, tuj evidentiĝas, ke la nuntempa laborista esperanta movado estas malgraŭ ĉio pli forta, pli vigla — pli firmstara ol antaŭmilite.

La ekzisto de semajna gazeto, kies vivkapableco montriĝis per eldonado de 100 kajeroj pruvas tion nerefuteble.

★

Ĉu tio signifas, ke ni devas esti kontentaj?

Tute ne.

Se kontentiga estas la laboro farita, la tasko kiu kuŝas antaŭ ni estas multe pli granda, postulas la ĉies laboron kaj atenton.

Unue atenton!

Ekzistas en la mondo pli ol 20.000 laboristaj esperantistoj, — dum SENNACIULO havas nur 3.000 legantojn. Ĉu normala estas tia situacio? Kial tiom granda estas la diferenco inter la du nombroj?...

Jen la problemo kiun temas solvi. Ni devas trovi la rimedon, kiu igos ĉiun laboristan esperantiston aboni nian gazeton.

— Tro alta estas la abonprezo, diras iu.

— Ĝin ni malaltigos...

— Ne sufiĉe interesa estas la enhavo de SENNACIULO eble diros aliu.

— Povas esti; tiaokaze helpu nin en la plibonigado; ne kontentiĝu per negativa kritiko, per indiferenteco.

Almenaŭ konsentu, ke nia programo kapablas kontentigi ĉiun klaskonscian laboriston esperantistan.

SENNACIULO estas ja senpartia organo, celanta liveri objektivajn sciigojn pri la laborista vivo el ĉiuj mondpartoj; ĝi celas klerigadi, edukadi per libera, larĝspirita prezento de ĉiuj problemoj interesaj por la proletaro.

Jen kia estas nia programo! Ne temas decidi ĉu *estinte* ĝi estis pli malpli bone aplikata; ni asertas ke tia estas nia programo, kaj ke sufiĉas la ĉies helpo kaj subteno por ke ĝi estu *estonte* plenumata.

★

Okaze de nia centa numero SENNACIULO rajtas voki al la 20.000 laboristaj esperantistoj:

Se vi konscias kiom grava estas por la laborista esperanta movado la ekzisto de semajna, multekzemplere eldonata gazeto; se vi deziras *inteligente*, ke via scio de esperanto ne estu senfrukta; se vi volas pruvi per faktoj, ke esperanto estas la plej taŭga interrilatigilo; unuvorte, se vi deziras la sukceson de la mondlingvo, vi ĉiel subtenos SENNACIULO-n.

La racio, la saĝo ordonas tion al vi. Sekve nia alvoko trovos eĥon ĉe la laboristaj esperantistoj, kiuj ja ne estas malsaĝuloj.

SENNACIULO.

La kongresa protokolo aperos sub formo de broŝuro kaj estos sendata al ĉiuj SAT-anoj.

Ekzistas ja saĝaj esperantistoj, kiuj ne abonas *Sennaciulo*-n, ĉar neniam ili havis en la manoj ekzempleron de ĝi. — Tiaokaze la malsaĝuloj estas la eldonantoj!

La sepjaro de «Sennacieca Revuo»

Legante la ĉi supran titolon eble multaj legantoj miros kaj pensos: ĉu estas eble, ke ĉi gazeto estas pli malnova ol SAT mem?

Necesas do kelkaj klarigaj vortoj. Nia Asocio ja fondiĝis nur en 1921. Sed, kiel ĉio en la mondo, ĝi ne havis miraklan naskiĝon. Ĝi stariĝis sur jam ekzistantaj bazoj. Kaj tiuj bazoj havas sian fundamenton en la apero de *Esperantista Laboristo,* la 1-an de aŭgusto 1919.

Tiutempe la gazeto estis dulingva: franca kaj esperanta. Sed, trafoliumante la unuajn kajerojn, observema okulo povas ekvidi, ke tute apartigitaj estas la du partoj. Nenia miksiĝo, kiel ekzistas kutime en la malnovaj esperantaj gazetoj. En la unua n-ro, tri paĝoj estas franclingvaj kaj nur unu, la kvara, estas en esperanto. En la dua numero jam la esperanta parto kreskis je du pluaj kolonoj; en la tria du grandaj paĝoj jam estas plenigitaj per esperanta teksto. La lukto inter la du partoj daŭras, kaj pli kaj pli la franclingva parto malampleksiĝas. En la 7-a n-ro, kvin paĝoj estas esperantlingvaj, kaj nur tri en franca lingvo.

Tamen estas ĉiam la sama gazeto, unu parto ŝajnas apogi la alian. Sed fakte ekzistas kaŝita lukto inter la malsamlingvaj paĝoj. Tia situacio longdaŭre ekzisti ne povas. Disiĝo ja okazis ĉe la oka n-ro. Jam ekestas du apartaj gazetoj: *Esperantista Laboristo* kaj *Le Travailleur Esperantiste,* kiuj ĉiu laŭ sia vivkapablo, iros de nun sian propran vojon. La unua montriĝis pli forta, pli vigla kaj senhalte fosis sian propran sulkon. *Le Travailleur Esperantiste* mortis post kelkmonata vegetado, dum la sendanka frato vigle kaj bataleme antaŭeniras, senĉese plilarĝigante sian agitkampon. Ĉe Praha, *Esperantista Laboristo* estis jam deksespaĝa gazeto kun 2.000 ekzemplera eldonkvanto, regule aperanta, havanta korespondantojn kaj legantojn en preskaŭ ĉiuj mondpartoj.

Ĉe la fondo de SAT, estis decidite ŝanĝi la nomon de la gazeto, kaj tiel la postkongresaj kajeroj surhavis la titolon *Sennacieca Revuo.*

Jen treege koncize kia estas la historio de la kvazaŭ pratempa ekzisto de la gazeto, kies sepjaron ni hodiaŭ jubileas.

Pri la posta historio ne necesas rakonti. Kredeble ĉiu scias, ke *Sennacieca Revuo* antaŭ du jaroj naskis idon (SENNACIULO) kaj tiam el Parizo forvojaĝis Moskvon, por tie esti prizorgata de lerta kolektivo en kies manoj ĝi jam ankoraŭ estas.

Malgraŭ siaj diversaj metamorfozoj *Sennacieca Revuo,* enradikiĝas ĉe la fundamento de SAT; kaj decas en tiu jubilea okazo ne forgesi tion. Necesas ankaŭ pensi pri la rimedoj kapablaj helpi ĝian pluan malvolviĝon sur la kampo al ĝi difinita.

Okaze de la *sepjaro* de *Sennacieca Revuo,* ĉiu literatur-amanto, ĉiu sciencemulo kaj pedagogo pensu varbadi novajn abonantojn al la patrino de SAT.

SAT-ano 1.

NIA POŜTO

Al ĉiuj K-doj, kiuj el Leningrad sendis amikajn vortojn, mi kore dankas. Samkiel vi, mi bedaŭras mian nepartoprenon al nia VI-a. La nunaj cirkonstancoj faris, ke mia batalposteno estis ĉi tie, dum la via estis tie, malproksime. Sed la pensoj, la sentoj estis tamen kunaj, kaj la atingita sukceso forigas ĉiujn bedaŭrojn...

E. LANTY.

★

Ni jam diris kaj ripetas, ke nur la Redakcio de SENNACIULO sidas en Paris. Nenio ŝanĝiĝis ĉe la Administracio. K-do Lerchner (Colmstrasse 1. Leipzig-O-27) daŭre zorgas pri la abonoj kaj ekspedo de la gazeto; li preparas la adresilojn. Sekve, oni sendu senpere al li ĉion rilatan al abonoj, reabonoj, adresŝanĝoj, kotizoj, libromendoj.

EKZEKUTIVA KOMITATO.

★

Mankas en ĉi n-ro la projektita *Radio-Paĝo,* tial ke ne trafis nin ĝustatempe la necesa materialo. Ni klopodas nun por ordigi la aferon.

La interesatoj estu certaj, ke estonte aperos regule kaj akurate la *Radio-Paĝo.*

★

233-466. — Bedaŭrinde mankas loko. Estonte dediĉu iom pli da tempo al via verkado, por plikoncizigi vian stilon. Bonvolu ankaŭ afranki ĝuste viajn leterojn; ni devis pagi trifrankan punafrankon por via lasta.

Red.

★

K-do Kennedy (en Gt. Bearsden P. O. ??) — via p. k. pri nova adreso estas nelegebla. Bonvolu ripeti. — *Adm.*

★

Senio Weingast. — Nur en okazo de nepra bezono ni povus enmeti artikolon de fremda al SAT persono.

ELDONA FAKO DE SAT

Tre baldaŭ aperos:

KARL MARX
lia vivo kaj lia verko
de V. ELSUDO

kaj

Ŝtato kaj Revolucio
de LENIN

Nun estas kompostata kaj aperos post du monatoj:

Je la nomo de l' Vivo
originala verko de E. IZGUR.

La volumo estos 226-paĝa, la teksto riĉe ilustrata kaj la presado luksa.

Baldaŭ aperos la II-a eldono de

Nur volu!

Estas nun preparata la II-a 20.000-ekzemplera eldono de

PETRO

★

Manuskriptoj abundas, nur mankas aĉetantoj de akcioj de nia Eldon-Kooperativo. — Tiuj akcioj valoras 1 amerikan dolaron kaj liveras al la posedanto renton je 10 %. Duondolaraj akcioj estas ankaŭ aĉeteblaj. Pliajn detalojn oni petu de la SAT-Administracio.

Okaze de la *trijaro* de Eldona Kooperativo de SAT aĉetu nepre almenaŭ 1 akcion.

Malnovaj vortoj ankoraŭ aktualaj

« Konsiderante, ke nur per faktoj ni sukcesos veki veran intereson pri esperanto ĉe niaj klasbatalaj organizoj...

« ... Ke la ĉefa tasko de nia Asocio povas neniel esti politika, ĉar jam ekzistas klasbatalaj organizoj ;

« Ke samkiel antaŭ 20 aŭ 30 jaroj estis nepre necese, ke ĉiuj praktikantoj de esperanto — ĉu pastroj, ĉu anarkistoj, ĉu policanoj — ariĝu por montri per faktoj, ke artefarita lingvo povas esti uzata en la praktiko, estas nun necese, ke ĉiuj laboristaj esperantistoj ariĝu en unu solan Asocion por montri al la Proletaro, per imponaj faktoj, kiom utilega estas esperanto por la batalo kontraŭ la kapitalisma sistemo... »

El la gvida rezolucio voĉdonita unuanime ĉe la fonda kongreso de SAT en Praha.



ĈE LA FONDO DE SAT : Praha 1921.



POST KVIN JAROJ : VI-a Kongreso, Leningrad, 1926.

TRA ESPERANTIO

Ĉe la laboruloj.

Esperanto — vojo al progreso de l'scienco

Artikolo de akademiano A. E. Fersman, aperinta en « Leningradskaja Pravda », la 7-an de aŭgusto 1926, No 180.

Lingvo estas unu el la plej potencaj iloj de rilato inter la popoloj. La diverslingveco estas unu el la plej ĉefaj baroj, starantaj sur la vojo al unuigo de l' laboruloj ĉiulandaj. Krei unuecan lingvon internaciskalan — tio signifas forigi ĉi baron. La garantio por la sukceso de esperanto estos plenumo de la kondiĉo, ke ĝi utiligu la radikojn el la lingvoj de ĉiuj nacioj. La prilaboro de tiuj radikoj, kiuj devos servi por plua disvolviĝo de esperanto, — estas serioza scienca laboro.

La Akademio de Sciencoj Sovet-Unia, stariĝinta en la kapo de l' scienca movado de U. S. S. R., ne povis, kompreneble, lasi sen atento ankaŭ tiun ĉi plej necesegan regionon de homa scio. Ĉe la Jafetidologia Instituto funkcias, ĉe la plej proksima partopreno de la akademia ĉefsekretario S. F. Oldenburg, sub la prezido de akademiano N. J. Marr, komisiono, okupanta sin per studado pri la historio de formiĝo de apartaj lingvoj kaj per esplorado pri similecaj radikoj.

La rezultoj de laboro de tiu ĉi komisiono, konsiderante la partoprenon en ĝi de tiaj eminentaj fakuloj de lingvoscienco, kiel S. F. Oldenburg kaj N. J. Marr, promesas esti grandvaloraj.

Esperanto estas la plej serioza provo krei artefaritan lingvon, komunan por ĉiuj popoloj. Scienculoj de la tuta mondo, vidantaj la pluran disfloron de sciencaj disciplinoj en la kreskanta unuiĝo de vastaj popolamasoj, en kiuj la scienco ĉerpas siajn fortojn por plua disflorado, — devas saluti esperanton, kiel unu el la vojoj por plifirmigo kaj plivastigo de tia unuiĝo. Por la scienco estas ekstreme grave, ke la plej uzataj terminoj kaj esprimoj estu samsignifaj por ĉiuj popoloj, por ĉiuj landoj kaj por ĉiuj nacioj. Al esperanto estas promesita venka marŝo, kondiĉe se ĝi plifirmigos sian ligon kun la sciencoj, okupantaj sin per studado pri historio de la lingvoj. Esperanto, estante lingvo artefarita, eniros la karnon kaj la sangon de l' laboruloj tutmondaj, se ĝi konsideros ĉiujn faktorojn pri tio, ke la lingvo de ĉiu popolo estas historie kunmetiĝinta fenomeno.

Kreo de unueca artefarita lingvo forigos unu el la baroj al la vasta unuigo de scienculoj kaj al disvastigo de scioj inter la laborulaj amasoj.

Akademiano A. E. Fersman.



Saluto

DE LA

Akademio de Sciencoj de U.S.S.R. al la VI-a SAT-Kongreso

Leningrad, 6/VIII 1926. No 5215.

Foresto el Leningrado de la Prezidanto de l' Akademio de Sciencoj, akademiano A. P. Karpinskij kaj de la Ĉefsekretario, akademiano S. F. Oldenburg, troviĝantaj en eksterlandaj sciencaj vojaĝoj, kaj ankaŭ ia neprokrastebla urĝa afero, deviganta min forveturi hodiaŭ vespere el la urbo, senigas la Akademion de Sciencoj de U. S. S. R. je la eblo esti reprezentata per unu el la membroj de sia Prezidantaro ĉe la solena malfermo de l' SAT-Kongreso.

Esprimante pri tio grandan bedaŭron, mi petas transdoni al la Kongreso la sinceran saluton de la Akademio de Sciencoj kaj la bondezirojn por plena sukceso en ĝiaj laboroj, direktitaj al la plej intima unuigo de l' laboruloj tutmondaj. La Akademio de Sciencoj esprimas la esperon, ke la esperantista movado estu potenca puŝo al la vasta disvolvo de internaciaj kunligoj inter la laborularo, unuigante la laborulajn amasojn en la nobla celado al la progreso kaj solidareco.

Restas al mi aligi al ĉi bondeziroj ankaŭ mian saluton al la partoprenantoj de la Kongreso.

Kun sincera saluto,

Akademiano A. E. Fersman.



La VI-a kaj la Soveta gazetaro.

Konsiderindan lokon dediĉis la soveta gazetaro al nia VI-a: Detalaj raportoj pri alveno de eksterlandaj delegitoj, iliaj fotoj, raportoj pri la laboroj de l' Kongreso, salutleteroj de la Akademio de Sciencoj, de Avioĥim (Societo por Aviada kaj Kemia Defendo), ODR (Societo de Radioamikoj), de K-do Lunaĉarskij ktp., intervjuoj kun la alilandaj kongresanoj kaj precipe la demando pri la internacia laborista korespondado kaj gazetservo plenigis Leningradajn kaj aliurbajn ĵurnalojn.

La *Leningradskaja Pravda* (Leningrada Vero) ĉiutage publikigis la resumon de la ĉefaj mondnovaĵoj en esperanto, por ke ankaŭ la eksterlandaj delegitoj povu ilin legi. Krome ĝi akceptis la kongresanaron en sia ejo por interkonatigo kun rusaj laboristoj. La *Krasnaja Gazeta* (Ruĝa Ĵurnalo) en siaj matenaj kaj vesperaj eldonoj dediĉadis grandan spacon al la prikongresaj kaj ĝeneralaj priesperantaj artikoloj. Multaj ĵurnaloj grandlitere kaj unuapaĝe salutis la Kongreson.

La radioamatora ĵurnalo *Novosti Radio* (Novaĵoj de Radio) publikigis grandan artikolon de K-do Nekrasov pri la internacia lingvo de radio. Kaj... malsaĝa kuriozaĵo... sub tiu ĉi artikolo iu idisto diras, ke « ido ne venkis ankoraŭ esperanton, sed necesas, ke la lingvistoj urĝe elektu la internacian lingvon ». Espereble la sovetlandaj K-doj klarigos al tiu ulo, ke ne lingvistoj, sed la vivo mem jam faris sian elekton.

Cetere tio estis la sola malagorda noto en la harmonia muziko de laŭdo kaj propagando por nia afero. E. Reto.

La Administracio akceptas eĉ la kvaronjarajn abonojn.

Esperanto je la servo de l' sindikata movado.

(Laboristaj korespondantoj.)

Ni publikigas ĉi leteron, por ke la laboristaj korespondantoj de Sennaciulo, *unu fojon pli, estu atentigataj pri la temoj, kiuj trovas bonan akcepton ĉe redakcioj. Ni jam kelkfoje diris kaj profitas la okazon por ripeti: ne verku politikecajn artikolojn, ne provu imitaĉi la profesiajn publicistojn; rakontu simple pri via vivo, pri via profesio, pri la moroj en via regiono kaj tiel nia gazeto akiros specialan karakteron, certan originalecon. Unuvorte ni ĉiuj penadu, por ke* Sennaciulo *neniel similu la nacilingvajn gazetojn.* — Red.

Letero
de la Redakcio de « Profruĥ Belorusi » (1).

Al Esperanta Centra Oficejo,

Estimataj Kamaradoj,

Je via buŝa demando pri « Folieto por internacia laborista interligo », presata en la gazeto « Profruĥ Belorusi », la Redakcio komunikas jenon: dum la duon-jaro de 1926 aperis en la 13 numeroj — 12 leteroj de eksterlandaj « labkor'oj » (laboristaj korespondantoj) 2 artikoloj de Minskaj esperantistoj kaj kelkaj fotaĵoj per vi ricevitaj. La leteroj de « labkor'oj » venis el Germanio kaj Hungario po 3, Ameriko 2, po 1 el Anglio, Estonio, Bulgario kaj Holando.

La aperon en nia gazeto de tiaj leteroj estonte ni konsideras treege dezirinda, ĉar ili interesas nian legantaron kaj konatigas la blankrusiajn laboristojn kun la viv-kondiĉoj de eksterlandaj K-doj.

Necesas ankaŭ noti unu dezirajon, kiu laŭniaopinie estas treege grava: **necesas ke la leteroj ne rilatu la ĝeneralan politikan analizon de la landa situacio...**

Dezirindas ke la leteroj sendataj al « Profruĥ » klarigu la sindikat-movadon, la laboron de sindikat-organizoj, la vivon de laboristo en familio kaj ĉe la entreprenejo, liajn kulturajn aspirojn kaj ilian kontentigon; ke ili rakontu pri laboristaj kluboj, pri tio, kion diras laboristoj pri Sovetio kaj iliaj delegitoj vizitintaj ĝin, pri la sukcesoj en scienco kaj tekniko aplikataj ĉe la produktado (2). Kaj se ĉiuj grandaj politikaj okazintaĵoj (striko en Britio, ĉiniaj okazintaĵoj k. t. p.) ankaŭ estus klarigataj de l' esperantistaj « labkor'oj » kaj se tiu klarigado koncernus profesiojn praktikatajn en Blankrusio (ledistoj, nutraĵistoj, lignaĵistoj k. t. p.) la Redakcio konsideros, ke la taskoj starigitaj por la « Internacia folieto » estas plenumataj.

Respondeca sekretario de Redakcio de « Profruĥ Belorusi »:

Ĵilin.

Minsk, 23-VII-1926.

(1) Profesia movado de Blankrusio, ĉefa organo por blankrusia sindikata movado.

(2) Necesas noti, ke ĝuste samajn postulojn antaŭmetas ĉiuj redakcioj, uzantaj la servojn de esperanta korespondado.

Ĉe la neŭtraluloj.

Kiel sciigite en la n-ro 96 de Sennaciulo, la neŭtralaj esperantistoj « kongresis » en Edinburg. Ŝajnas, ke ili estas tre diskretaj, rilate la nombron de partoprenantoj. La korespondanto de « Heroldo » parolas en sia unua raporto nur pri la kutimaj amuzaĵoj. Ni do atendu por ekscii ĉu la kunigo de katolikoj, protestantoj, framasonoj, laboristoj kaj negocistoj ebligis grandnombran alvenantaron de « samideanoj » en la skotan urbon.

La Kongreson de la neŭtraluloj ankaŭ partoprenis kelkaj socialistoj, kiuj kredeble ne sciis pri la VI-a laborista Kongreso en Leningrad. Ili almenaŭ konas la adreson de Sennaciulo, ĉar ni recevis raporton pri iu « fakkunveno de socialistoj ». Ni tre dankas pro tio.

La raporto estas sufiĉe longa, sed bedaŭrinde mankas ankaŭ la sciigo pri la nombro de partoprenintoj. Estas almenaŭ dirite, ke la kunvenon prezidis « S-ro » (tiel) F. Azorin (Hispanio), ke K-do el Britio raportis pri la funkciado de B. L. E. S. (Brita Ligo de Esp. Soc.). Gratulinte la raportinton, la prezidanto parolis pri « Esperantismo kaj socialismo ». Diskutado sekvis. Parolis K-do el Holando, alia el Stuttgart. Pri Hungario « S-ro » (tiel) J. Major raportis.

Fine K-do Hawkins el la Londona Esp. Lab. Klubo proponis, ke oni sendu telegramon al la redaktoro de « Daily Herald » (ĉiutaga Heroldo), dankante lin pro lia subtenado al esp-o. Post la kantado de la « Internacio » fermita estis la kunveno.

Jen estas la tuta substanco, kiun ni povis ĉerpi el tiu tri paĝa raporto.

Kaj nun, oni permesu al ni fari jenan demandon: Ĉu en la telegramo sendita al la redaktoro de « D. H. » oni aparte gratulis lin pro tio, ke la anoncoj pri B. L. E. S. estas ĵetataj en paperkorbon kaj aperas nur tiuj de B. E. A., la neŭtrala societo?

For la neŭtralismon!...

HELPU!

Germanlingvaj Kamaradoj!

Ne delonge aperis en germ. lingvo la verko de l' socialista profesoro *Th. Hartwig:* « Der Kosmopolitische Gedanke! » (La Kosmopoliteca Ideo).

Por ni, sennaciuloj, tiu libro havas netakseblan valoron. Ne povas esti eĉ dubeto pri tio ke ĝi estas *urĝe tradukenda* esperanten. El tiu 216-paĝa libro ni devas uzi la maksimumon de materialo.

Kamaradoj! Inter vi estas multaj anoj de l' Literatur-Fako de SAT. Inter vi estas multaj kapablaj kaj laboremaj tradukontoj. La verko havas serion da ĉapitroj (Kosmopolitigo de l' homaro. — Vojoj al mondcivitana ideаro. — La pragmata Kosmopolitismo. — La emocia Kosmopolitismo. — La racieca Kosmopolitismo. — La realiĝanta Kosmopolitismo, k. t. p.) — Do jen estas laboro, kiu facile estas farebla *kolektive.*

Laboremaj sperthavaj K-doj! Anoncu vin al K-do H. Muravkin, Paulsborner str. 21, 1, Berlin-Halensee. Tiu K-do interkonsentos kun vi pri la dispartigo kaj farmaniero de l' laboro.

La Hispania Kaoso

Eklezio kaj persekutado ĉie.

Hispanio troviĝas en stato formiga. Tial ke la eklezio enradikiĝis tre profunde, ĉie la popolo estas ankoraŭ kvazaŭ en letargio, ĉefe la kamparanaro. Imagu kiel povas esti popolo dudekmilione nombra kun *4.800 monaĥejoj!* Nur en Katalunio da ili troviĝas pli ol *900*. La registaro de Primo de Rivera estas ĉefe konfesia (1); pro tio la monaĥismo nun estas pli riĉa, pli potenca kaj aroganta ol iam ajn. Hispanio estas ampleksega monaĥejo. En 1860, la eparĥio barcelona havis neniun monaĥejon kaj 22 monaĥinejojn; nun ĝi havas 560 monaĥejojn!...



LA HISPANIAJ PARAZITOJ

Plej multaj monaĥoj sin dediĉas al instruado kaj al ekspluatado de fabrikoj, uzinoj kaj ĉiaspecaj komerc-entreprenoj, krom interveno ĉe karceroj, orfejoj, hospitaloj, aziloj ktp., apartenantaj ĉu al la ŝtato, ĉu al urbo aŭ provinco. En la barcelona eparĥio (proks. unu miliono da loĝantoj) ekzistas pli ol *7.000* institucioj, societoj, fratejoj, rondoj ktp., kies karaktero estas klerikala kaj kiuj estas gvidataj laŭ monaĥismo pli malpli kaŝa. La subtenado al tiuj *katolikaj sidejoj* (300 paroĥoj kaj 3 mil salajruloj), monaĥejoj, katedralo, seminario, 2 episkopoj, kanonikoj, beneficuloj kaj eklezia personaro ĝenerale, kostas pojare proks. 10 milionojn da duroj. Ĉi tiu nombro estas la oficiala, sed okazas, ke multaj monaĥejoj malhelpas al ia kontrolo kaj faras sian enŝoviĝon sekrete, kaŝante sian veran mision. La instruado unua- kaj duagrada estas, kiel la Universitato, en iliaj manoj.

Ĉio antaŭdirita klarigas kial la popolo estas tenata sub la jugo religia. Aliparte la persekutaj rimedoj energie aplikataj kontraŭ la propagandistoj kaj ribelantoj tre efikis profite al la burĝaro kaj katolikaro; ili estas tiom perfektigitaj, ke tiom granda nombro da « gardantoj de la ordo » vere timigas eĉ la plej kuraĝan K-don.

1) Konfesia: konfesanta kredon en religio.

Sennaciulo estas aĉetebla poekzemplere en ĉiuj SAT-agentejoj.

Malkonsento inter parazitoj.

Lastatempe montriĝis ekribelemo flanke de la grandaj kapitalistoj kontraŭ la Diktatoro, sed ne por bonigi la staton de la laboristoj, nur kontraŭ la egoismo de la altranguloj. Ni kompreneble ne fidas al tiuj generaloj, grafoj kaj bankistoj; ili faros nenion bonan por ni; nur ili intencas ekspluati nin plej trankvile kaj facile. Tamen estas ĝojiga fakto, ke ili reciproke sin persekutas kaj ni ekvidas el tio, ke ni povos iom profiti la kaoson, kiun ili estigos. Ni esperas, ke ili milite interluktos (bedaŭrinde rekte la batoj falas sur la laboristojn), por ke bankrotu definitive la klerikalismo. La lastaj okazintaĵoj negravas objektive, sed ili estas atentinda simptomo de la fortoj nesinmontrintaj, kiuj konstante plikreskas kaj *morgaŭ* fariĝos vivaj.

Revolucio nepre.

Hispanio sin savos nur per revolucio. Sen ĝi, estas neeble ion ajn pozitivan fari... Sed kiam revolucio fine okazos, estos terurege; ĉiu konsentas pri tio. Ĉie oni konspiras; verdire estas nur grupetoj, sed agemo plikreskas...

Ni prepariĝas per la studado de la problemoj armeaj, ekonomiaj, instruaj, organizaj, administraj... por la estonta batalo.

Se nun okazus revolucio, se la nuna ekvilibro rompiĝus, estus preskaŭ neeble kunigi ĉiujn hispanojn sub iun standardon: ja fortaj partioj ne ekzistas, individuismo regas la spiritojn kaj bedaŭrinde la popolo estas plejparte malklera.

Kaosa estas la nuna situacio en Hispanio kaj ni ne povas esperi baldaŭan ordigon de la aferoj.

El raporto de J. Comoposada.

SAT-konferenco de la V-a sektoro okazos la 5-an de sept., je la 14-a horo, en Dortmund, Germ. en « Reinolsduhof », Hansa placo. — Grava tagordo. — A. v. d. Heid.

Grava komuniko

La Ekzekutiva Komitato decidis :

1) **Malaltigi la abonprezon de « Sennaciulo » ;**

2) **Donaci premion al ĉiu nova abonanto ;**

3) **Donaci valorajn premiojn al la varbantoj de novaj abonoj.**

Detaloj kaj precizaj sciigoj aperos en la venonta n-ro. Ni estis devigataj fari tiun prokraston pro la foresto de nia administranto, K-do Lerchner, kun kiu ni devas antaŭe pritrakti la koncernajn aranĝojn.

★

Pri *La Lernanto,* ni atendas la rezultojn de intertraktoj kun kelkaj nacilingvaj esperantaj organizoj por fari apartan grandkvantan eldonon de tiu Folio, kiu havos tute alian karakteron ol tiun de la ĝis nun eldonita.

La abonantoj de Sennaciulo ricevos kiel antaŭe *La Lernanto*-n sen plua aldonpago.

Ekzekutiva Komitato.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Pro la unueco de nia afero ĉiu bona esperantisto devas antaŭ ĉio bone koni la *fundamenton* (*) de nia lingvo.

L. L. ZAMENHOF.

(*) Havebla ĉe nia Administrejo estas la « Fundamento de Esperanto ».

KORESPONDADO

TARIFO

Unu enpreso : Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ : L — letero, PK — poŝtkarto. PI — poŝtkartoj ilustritaj. PM — poŝtmarkoj. bfl. — poŝtmarko sur bildflanko. k. ĉ. l. — kun ĉiuj landoj. esp-aĵo — esperantaĵo.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Aŭstrio.

K-do *Hans Schmutz* (Junulo), *Neuda ap. Pöchlarn,* dez. koresp. kun la tuta mondo. Resp. garantiata.

— *ALLE grupo* dez. interŝ. L, PK, PI, k. ĉ. l. krom Aŭstrio, Germanio k. Cekoslovakio. Adr. : *ALLE grupo,* Widmanng. 27, *Villach.*

— K-do *Josef Rothbauer.* Alp. Jäger Rgt. 8, 4. Komp., *Wels,* interŝ. por sia amiko PM, PK, prec. de nordaj landoj. Resp. garantiata.

Germanio.

K-do *Alfred Bachmann,* Körnerstr. 5, *Chemnitz i. Sa.*, dez. koresp. pri ĉ. temoj, k. ĉ. l.

— K-do *Alfred Müller,* Fürstenstr. 38, *Chemnitz i. Sa.*, dez. koresp. k. komjunularanoj k. ĉ. l.

— K-do *Johann Panzer, Leupoldsdorf, 10, ap. Wunsiedel* i. Fichtelgeb. dez. koresp. pri ĉ. temoj, precipe porcel. komerco, k. ĉ. l.

— K-do *Gerhard Uhlig,* Turnerstr. 6, H. *Mittweida i. Sa.* dez. ŝakludi per koresp., nur kun Anglio, Francio aŭ Hispanio.

— K-do *H. Wendt,* Karlsplatz 20, *Freiburg i. B.* (18 j. junulo) dez. koresp. L, PK, kun junuloj el Sovetio, ĉiam resp.

Jugoslavio.

K-do *Josip Rozmarić, Koprivnica,* dez. koresp. PK, PI, Bfl, k. ĉ. l.

Sovet-Unio.

K-do *P. T. Nosov,* sevkavselbank, sev. kav. kraj. *gorod Salsk,* dez. koresp, kun ĉ. l. gek-doj pri ĉ. temoj, L, PK, PI, k. ĉ. l.

— K-do *Voldemaro Ĵarov,* statisto-ekonomisto, Kooperativnaja 10, *Bogorosk,* Moskva gub. dez. koresp. pri lab. movado, socia vivo kaj kooperacio L, PK, k, ĉ. l.

— K-dino *Lubovj Ĵarova,* dentkuracistino, Fabrika Gluhovskoj manufaktury, Krasnaja sloboda 224, *Bogorodsk,* Moskva gub. dez. koresp. pri ĉ. temoj, L, PK, k. ĉ. l.

Ĉiu radio-amatoro
Ĉiu deziranta studi la radiosciencon
Ĉiu volanta aŭskulti la radiosendojn
Ĉiu kiu volas propagandi esperanton inter radiistoj

devas aboni la ĵurnalon

INTERNACIA RADIO-REVUO

Ĉefaj artikoloj aperintaj en unuaj 7 numeroj :

Propagiĝo de la ondoj (R. Mesny) — La plej simpla ricevilo — Unulampa ricevilo — Paŝo post paŝo (teoriaj babiladoj) — Kiel fari bonan antenon kaj terkonekton — Zoologia studo pri radioamatoro — Radio-Enciklopedio — Esperanto por Radio, Radio per Esperanto ktp.

La sama ĵurnalo aperas ankaŭ en speciala eldono por blinduloj. Fundamenta stilo estas zorge observata.

Jarabono 1/2 dolaro.

Postulu kontraŭ respondkupono 40-paĝan specimenon.

Eldonejo : Etienne Chiron, 40, rue de Seine, Paris (VI^e).

PIONIROJ, ATENTU !

La centra organo de Ukrainia Centra Oficejo por Komunista Infanmovado « DYTJACY RUH » (ĉiumonata) petas la pionirajn grupojn eksterlandajn, ke ili alsendu informojn kaj artikolojn pri sia vivo kaj laboro, ankaŭ fotojn kaj desegnojn. La taŭga materialo aperos en nia revuo kaj en la ĉiusemajna gazeto pionira « Juny Lèninec ». Rekompence ni aperigos la adresojn de l' grupoj-korespondintoj en la nomitaj organoj; la artikolverkintoj ricevos laŭkutiman honorarion kaj aŭtorajn numerojn.

Nia adreso : *Ĥarkov* (Sovetunio, Ukrainio), stary pasaĵ, n-o 22, vydavnyctvo « Juny Lèninec ». Redakcija « Dytjaĉy Ruĥ.

Okaze de la kvinjaro de SAT, ĉiu membro devas nepre varbi unu alian membron.

Le Gérant : L. GLODEAU. ★ Esperanto-Presejo J. Solsona, 9, Rue Hallé, Paris-14e — Telefono : Gobelins 62-71